



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 3  
1975

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo  
42.a (51-a) jaro  
Dumonata

ERLING WELLE-STRAND :

## La plej bela marvojaĝo en la mondo

Persono kiu travivis la vojaĝon al norda Norvegujo dum sia junaĝo, ofte surprizas sin mem, veturante per la Rapidŝipo en speco de songosimila memorstato. Li vojaĝas trans kirlantaj torentoj, en mistera marnebullo tra muĝantaj ondrompiĝoj, sed plej ofte laŭ trankvilaj sundoj, kie la fundo brilas blanke sub la ŝipo en vitrokla akvo. «La plej bela marvojaĝo en la mondo», multfoje estas dirite kaj skribite. La rapid-ŝipo estas tamen ankoraŭ pli: Vojaĝo en la limlando inter sono kaj realo.

Eĉ la dimensioj de la vojaĝo estas fabelaj. La totala distanco de la vojaĝo Bergen—Kirkenes—Bergen estas 2600 naŭtikaj mejloj, t.e. ca. 5000 kilometroj, kaj ĝi iras tra 8 norvegaj provincoj. Dumvoje oni pasas la plej okcidentan punkton de Norvegujo ekstere de Sognefjordo, la plej nordan ĉe Nordkabo kaj la plej orientan ĉe Vardø. Kiam oni pasas la arktan cirkolon, nur la duona vojaĝo estas farita. «Oni devas pensi pri multaj aferoj, kiam oni staras sur la ponto»,

iam diris al mi piloto de la rapid-ŝipo. Li havis 5000 ŝip-kursojn kaj 1500 lumturojn kaj lanternojn en la memoro.

Ankaŭ estas multo por vidi por turistoj. En aliaj lokoj de la mondo la regionoj norde de la polusa cirklo estas vere arktaĵoj. La rapid-ŝipo tamen sekvas la Golfan Fluon kaj la antaŭenpuŝon de la kulturo 100 mejlojn en la polusajn regionojn. Neniu povas ne surpriziĝi pri la somera fekundeco de norda Norvegujo.

Per la rapid-ŝipo oni vojaĝas tra «la griza regno», la insularo norde de Bergen, transiras la larĝan sojlon de Sogne-marĉo kaj vidas elmergi el la akvo la mirindajn marsignojn de Sunnfjordo: Kinnakloven kaj Batalden. La ŝipo glitas antaŭen sub la timiga rokmuro de Hornelen, tra Måløy-sundo kaj eksteren sur la tanganta Stad-marĉo. La sceno ŝanĝiĝas al Sudmørĉaj fiŝhavenoj kaj Romsdalaj fjordoj, Nordmørĉaj marpejzaĝoj kaj Trondaj ebenaĵoj, antaŭ ol la rapidlinia ŝipo premiĝas tra la mallarĝa

pasejo ĉe Rørvik kaj en la Nordland-an ŝipirejon. La lando promesita kontentigas la atendojn, unu post alia. Leka, Torghatten, la Sep Fratinoj kaj Hestmannen — la fabelfiguroj kiuj ŝtoniĝis kiam troloj kaj gigantoj furiozis plej sovaĝe kaj la suno tro subite supreniris, ĉiuj sin prezentas por la pasaĝeroj de la rapid-ŝipo. La dramo estas ludata denove por ĉiu turista ŝipo.

Malmulte da dormo la pasaĝeroj de la rapid-ŝipo ricevas. La nokto havas ferion, mem oni havas ferion, kaj la dormo estas nuligata. Oni ŝtelas kelkajn horojn da dormo en malpli interesaj lokoj, ekz. kiam la rapid-ŝipo transiras la Vestfjordon, sed denove estas surpiede, kiam la ŝipestro funkciigas la ŝip-sirenon ĉe Stamsundo. La Lofotmuron oni devas travivi, kaj kiu povas tradormi la Raftsundon? En la trembrilanta kontraŭlumo ma-

ro kaj lando egaliga, do ne estas strange, ke ŝipoj surgrundiĝas en tiaj trolfjordaj akvoj.

Tra la Risøykanalo (Risøyrenna), kie la ŝipo preskaŭ skrapas la fundon, la rapid-ŝipo englitas en la provincon Troms. La velejo inter Senja kaj la ĉeflando havas verdajn terlangojn kaj arbarajn deklivojn. Ryststraumen iras torento rapide sude de Tromsø, la fjordoj mordbojas kontraŭ la pasaĝeroj per aludentaj faŭkoj — la velado en Troms ne donas al la sensoj ripozon.

«Birdroka ŝipirejo» estas bona kaj indulga nomo de la krutaj marbordoj de norda Troms kaj okcidenta Finnmarko. Neniu dubo ke ĉi tio estas la «Ultima Thule». Kalvaj montoj, ŝvelondoj de l' Arkta maro kontraŭ senvivaj strandoj. Sed subite staras nubo da birdoj for de la roko, kiantaj mevoj kiuj nestas en la krevoj de la Hjelmøy-fosto kaj la Sværholt-klabo. Maksimalan prilogadon havas tiuj birdrokoj en majo, sed abunda vizitado estas garantiata tra la tuta somero.

Ĉe la plej grandioza celo de la vojaĝo, Nordkabo, multaj kune kun la skota poeto Thomas Carlyle fariĝas profunde ravitaj: La granitverdaj rokoj, la maro kiu en la arktika lumo malrapide leviĝas kaj pace murmuras; la suno kiu super ĝi pendas malalta kaj inerta, estingiĝanta kvazaŭ malsuprensraŭbata lamp-meĉo. Ni rondas Nordkabon kaj pluvelas sur la Barentsa maro kontraŭ la turnpunkto de la vojaĝo, Kirkenes, ĉe la rusa limo.

El la norvega tradukis  
*Henry Fridén*

## HELSINGØR 1975

*tuj antaŭ UK de Kopenhago*

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe

**EVA LANGKILDE**

Ingemannsvej 18

DK-3000 Helsingør, Danlando

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro :

Hans Amund Rosbach  
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio :

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N  
(Limdato por manuskriptoj : la 20.  
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo : En Norvegujo kaj eksterlando : n. kr. 12,—.

Anonprezoj : 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,  
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

## La kontorfondajo

Pli frue .....	kr. 603,—
Ragnv. Berli .....	» 20,—
K.S.K., Moss .....	» 50,—
H. Danielsen .....	» 124,—
C.S.B. ....	» 20,—
La Norda Stela .....	» 100,—
R. Bugge-Paulsen .....	» 30,—
Th. Smådahl .....	» 5,—
S. Gjermundnes .....	» 20,—
Olav Reiersøl .....	» 100,—
«Gitt» .....	» 50,—
	kr. 1122,—

## La Propaganda Fondajo 1975

Pli frue .....	kr. 119,—
Sverre M. Halbo .....	» 50,—
La Norda Stelo .....	» 100,—
«Gitt» .....	» 50,—
	kr. 319,—

## Kampanjo Reisæter 1975

Plie frue .....	kr. 300,—
«Ni du» .....	» 200,—
Elna Matland .....	» 100,—
Johan Matland .....	» 100,—
O. J. Rønnevig .....	» 100,—
Olav Thormodsen .....	» 100,—
	kr. 900,—

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj !

## Korekto kaj aldono al la Jarraporto de N.E.L.

En la Jarraporto de N.E.L. en la pasinta numero okazis fuŝaĵo en la listo de la kluboj. Bonvolu legi:

Halden, Ascendo, Or. D. .... 8  
Hamar, La Norda Stelo, Or. D. .. 23

Plie ni deziras aldoni jenan alineon:

*Literaturo.* Aperis nova verko de Johan Hammond Rosbach, ĉi-foje romano, «Verda robo», efektive la unua romano en Esperanto, verkita de norvega. Ĝi estis favore recenzata en multaj Esperanto-gazetoj, kaj vigle vendiĝas.

## 44-a Norvega Esperanto-Kongreso

*Aldono al la tagordo.* Tuj antaŭ la laŭstatuta limdato venis proponoj pri statutŝanĝoj. La Estraro dissendos ilin per cirkulero al la kluboj.

## Subtenantaj Membroj 1975.

Anton Gjelstad  
Agnete Anjer  
Ludvig Anjer  
Bjørge Skaret  
Pepita de Caspary

## Sciigoj de N.E.L.

*La aŭtuna agado.* Planu jam nun, antaŭ la somero, la kursojn kaj studrondojn por komencantoj, kiuj devos efektiviĝi dum la aŭtuno. Faru planojn por ekspozicio, kampanjo en la gazetoj k. t. p. de la fino de Aŭgusto, kaj ne ripozu antaŭ ol vi sukcesis kolekti sufiĉe da lernantoj por kurso por komencantoj, kun iu membro kiel kursgvidanto, aŭ kun la koresponda kurso kiel bazo. Klopodu ankaŭ igi gazeton aperigi la gazetan kurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provoleciono, kiujn vi povos montri en la redakcio). Ni bezonas novajn kaj junajn fortojn. Ĉi tiun alvokon ni direktas ankaŭ al la rektaj membroj. Ni plezure helpas ilin. Post kurso aŭ studrondo oni povos formi Esperantoklubon en la loko. Ni tre deziras fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Junio:* La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

*Julio:* Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la Distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1-a jarduono dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

*Aŭgusto:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

*Septembro:* La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 1-a jarkvarono.* Okazis 3 estrarkunvenoj, kaj oni elsendis 2 cirkulerojn. Oni pretigis la budĝeton por 1975 kaj la jarraporton kaj jarkalkulojn pri 1974, kaj starigis la tagordon de la landa kunveno dum la 44a Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø. Nova klubo fondiĝis en Alta. Oni laboris pri planoj de prelegvojaĝoj, kaj efektiviĝis mallongan unuan viziton de J. Minani el Burundio en Oslo kaj Sarpsborg. Nova gvidanto de la Junulara Sekcio fariĝis Sigrun Mæland. Komisiito pri la Virina Jaro fariĝis Margrete Landmark. Oni diskutis planojn rilate la financan kampanjon de U.E.A. kaj rilate la aktivecojn okaze de la Jardeko kontraŭ Rasismo, kaj la projekton de nova statuto de U.E.A. Nils Utne reprezentis la Ligon en la jarkunveno de N.E.F.A.

La Liga Estraro.

## Tromsø — malgranda urbego

Kiam vi espereble venos al Tromsø komence de julio al la kongreso de NEL, vi sciu, ke vi estas en la plej granda urbo de nia lando. Eĉ en unu el la plej grandaj urboj sur la tuta tero! Mire, kaj evidente tute nekredible, ĉar, kiel vi eble scias, la loĝantaro de Tromsø nombras nur iom pli ol 40 000.

Sed se ni kalkulas laŭ areo, la supra aserto estas facile pravigebla. La areo de Tromsø estas pli ol 2500 km<sup>2</sup>. Tio estas pli ol kvinfoje la areo de Stor-Oslo, kaj pli ol la areo de la gubernio Vestfold.

Leĝe Tromsø fariĝis urbo en la jaro 1794. Sed jam ĉ. la jaro 1250 la reĝo Håkon Håkonsson konstruigis preĝejojn tie. Samtempe aŭ iom poste konstruigis fortikaĵo «kontraŭ atakoj de rusoj kaj karelioj». Tiu reduto estas la nuna «Skansen», leĝe konservata parto en la urbo. La unua komercisto pri kiu oni scias estis en la urbo en la jaro 1536.

La evoluo certe estis kiel ĉe ĉiu alia urbo. Kiel do klarigi, ke la urbo subite fariĝas la plej granda urbo en la lando? Kaŭzo estas ekonomi-politika:

Meze en la nuna urbego estas la insulo Tromsøya, kiu ampleksas 22 km<sup>2</sup>. Sur la orienta flanko de ĝi ekstis la origino de la urbo. Sed la urbo areis nur etan parton de la insulo — 1,7 km<sup>2</sup>. La restaĵo de la insulo apartenis al la komunumo Tromsøysund, kiu en siaj 1500 km<sup>2</sup> havis 15000 loĝantojn, kiuj loĝis sur

la ĉirkaŭantaj insuloj kaj sur parto de la kontinento.

Tute nature venis la tempo, kiam la urbo, kun 12000 loĝantoj sur malgranda areo, deziris ekspansii. Ĝi estis la centro de la gubernio, komerce kaj administracie. La urbo povus okupi la tutan insulon, kaj pligrandiĝi 13-foje. Sed Tromsøysund protestis, dirante: La plej riĉaj homoj en la urbo, komercistoj kaj aliaj, plejparte loĝas sur la insulo ekster la urbolimo, kaj do pagas imposton al nia komunumo. Se ni perdas ilin, nia komunumo malriĉiĝas. Tiam proteston oni ne povis neglekti. Rezulte kreiĝis la nuna urbego, el la antaŭa Tromsøysund kaj malgranda parto de la komunumoj Hillesøy kaj Ullsfjord.

Rilate la kongreson de NEL ĉi-tie estas rimarkinde, ke duone la partoprenontoj estas eksterlandanoj, el 8—10 landoj. La klarigo pri tio certe estas la jena: Multaj eksterlandanoj ofte revis pri vizito al Norda Norvegujo. Se ili estas esperantistoj, ili nun uzas la okazon, efektiviĝi sian revon kombine kun vizito al samideanoj en ekstrema parto de la tero. Kaj kiuj ajn ili estas, ni salutas ilin: BONVENON!

Johan Eilertsen.



## R E M E M O R E

## Sonja Jørgensen

Sonja Jørgensen, multjara fakdelegito pri turismo en Trondheim, mortis la 9/10 1974. Ŝia vivo estis plenigita de agado pri kaj por la internacia lingvo. Ŝiaj plumamikoj, kiuj nun malhavos ŝiajn regulajn salutojn, certe estas tre multaj.

La cirkonstancoj ĉe ŝia malsaniĝo en taŭga maniero manifestas la solidarecon, kiun oni povas renkonti inter samideanoj neniam renkontinte unu la alian. Sonja Jørgensen malsaniĝis dum vojaĝo al la oriento, kaj la aeroplano surteriĝis en Taŝkento, kie ŝi estis enhospitaligita. Ŝian kormalsanon, kiu akutiĝis dum la flugado, ŝi bone konis de pli fruaj kuracoj, sed, fatale, ŝi ne povis informi la taŝkentajn kuracistojn pri tiuj gravaj faktoj, ili parolis nur la rusan lingvon. Ŝi tamen havis ŝian Jarlibron de UEA, kaj la alvokita delegito de Taŝkento, Petro Poliŝĉuk, facile peris la lingvan kontakton.

Petro Poliŝĉuk ne finis sian taskon per tio. Li tuj skribis al la delegito en Trondheim kun informo pri la pasintaj eventoj. Estas vere kortuŝe vidi, per kiaj zorgoj li dediĉis sin por plifaciligi la horojn de homo malsana, tute fremda al li, dum ŝi kolektis fortojn sufiĉajn por revojaĝo.

Ricevinte nian informon pri ŝia morto, Petro Poliŝĉuk sendis al ni leteron, el kiu li petis nin publikigi en Esperantobladet jenajn vortojn: Antaŭ ĉio, mi esprimas miajn kondolencojn okaze de la forpaso de nia

komuna konatino, samideano Sonja Jørgensen. Mi devas diri, ke ŝi estis entuziasma Esperantistino kaj turistino, kaj ŝi meritas, ke oni ne forgesu ŝin. Ni, taŝkentaj geesperantistoj, estas anime kontentiĝintaj, ke ni iel povis helpi al nia norvega samideano, dum ŝi estis en malfacilaj cirkonstancoj — dum ŝia malsana stato. Mi petas vin, kara samideano Haugen, se iam vi vizitos la tombon de Sonja, bonvolu meti, almenaŭ, unu floreton sur ŝian tombon, kiel simbolan florkronon, kaj se eblas bonvolu aŭ anonci antaŭ via klubanaro, aŭ publikigi en via presorgano esperanta, miajn, ĉi suprajn vortojn.

Grupo Esperantista de Trondheim

## Fin Hole forpasis

La 25an de Marto forpasis en Mandal dentkuracisto Fin Hole. Li estis modesta homo, sed tre aktiva en diversaj publikaj kaj bonfaraj organizaĵoj kaj estraroj. Kun Esperanto li konatiĝis antaŭ proks. 15 jaroj kaj poste ĉiam restis fidela, aktiva membro de NEL. Pacon al lia memoro.

C.S.B.

## Mathilde (Molla) Pettersen

La 5an de Majo s.ino Molla Pettersen, unu el la aktivaj membroj de la iama Esp.-klubo en Kristiansund, mortis. Ni deziras pacon al ŝia memoro.

## Ĉu vi tradukas?

Anlegget av Petersplassen skriver seg fra årene 1656 til 1667, da Bernini arbeidet på det.

Plassen som har en elliptisk form, omgis som av to armer av Berninis kolonnader, som består av 284 søyler.

Midt på plassen reiser det seg en kjempemessig obelisk på over 25 meter som hviler på ryggen av fire bronseløver.

I spissen av denne obeliskens stod ifølge tradisjonen en gullurne med Cæsars aske.

I dag gjemmer spissen av monumentet en relikvie av det hellige kors.

Arbeidet med å flytte og reise obeliskens beskjefteget nesten tusen arbeidere i fire måneder.

## TRADUKU!

1. «Anlegg» kan være så mangt — fra evner, talent (*kapablo, talento*) til f.eks. elektrisk anlegg (*instalaĵo*). Det kan også bety at man støtter sitt gevær til skulderen (*alsultrigo*) eller et fabrikkianlegg (*establaĵo*). De fleste nordmenn har hørt om Vigelandsanlegget. Her passer ikke noen av de nevnte ord. Vi prøver med parko. I vår setning må vi finne enda en annen oversettelse. Vi konstaterer at man ikke kan bruke en ordbok uten omtanke. Skal vi foreslå ganske enkelt *aranĝo*?

«Skriver seg fra» — vi forstår straks at *skribi* ikke er velegnet. Bruk *datiĝi*.

«Bernini arbeidet på Petersplassen» vil ikke si at hans arbeidssted var Petersplassen, men at han som vi i dagligtale ofte sier «holdt på med». En brukbar glose er *labori pri*.

Forslag til oversettelse av første setning:

*La aranĝo de la Placo de Petro datiĝas de la jaroj 1656 ĝis 1667, kiam Bernini laboris pri ĝi.*

2. Vi skal også se på ordet «plass». Det kan ikke uten videre oversettes med *placo*, fordi dette ordet betegner en åpen plass (et torv) i en by eller en åpen plass (en lysning) i en skog. Hvis man søker en plass i arbeidslivet, kan *ofico* eller *okupo* være gode ord å kunne, er det snakk om en plass på tog eller buss, er det *loko*, eller mere presist *sidloko*. En plass kan også være et småbruk, og da heter det *farmeto*.

Det står i setning nr. 2 at plassen «omgis» av kolonnader. Brukbare ord er *ĉirkaŭiĝi* og *enkadriĝi* («innrammes»), mens *ĉirkaŭbariĝi* ikke passer.

«som» kan være et problematisk ord. Ofte er det relativt pronomen, men ikke her, så det ser vi bort fra. Det gjenstår å velge mellom *kiel* og *kvazaŭ*. *Kiel* («slik som») er sterkere, mere konkret, enn *kvazaŭ* («lik-som»).

Forslag:

*La placo, kiu havas elipsan formon (kiu estas elipsforma), ĉirkaŭiĝas, kvazaŭ per du brakoj, de la kolonaro de Bernini, kiu konsistas el 284 kolonoj.*

Bemerkning 1. Det siste *kiu* kan teoretisk vise til Bernini, men ingen



vil finne på å misforstå i dette tilfelle. Vi kan imidlertid godt tenke oss tilfeller som muliggjør misforståelser, f.eks. «min brors venn som...». Del da opp. Det kan vi også gjøre her: «...de la kolonaro de Bernini. Tiu kolonaro konsistas el...». Dette er å foretrekke.

Bemerkning 2. På esperanto er komma før og etter det innskutte ledd «som av to armer» mere påkrevet enn på norsk. De fleste moderne esperantoforfattere bruker komma i slike tilfeller.

3. «Midt på plassen» kan være *meze de la placo, en la mezo de* eller *en la centro de la placo*. Det står at obeliskene «hviler» på løvene. Her kan man ikke bruke *ripozi*. Vi får søke oss frem til *apogi*, som betyr å støtte og styrke noe ved hjelp av noe annet. Altså *apogigi*. Men setningen blir meget lettere dersom man snur på det og sier at bronseløvene støtter eller holder obeliskene. Og så har man det fenomen som så ofte har vært problem for mange: «på ryggen av fire løver» — skal det stå *dorso* eller *dorsoj*? På esperanto er det ingen tvil: man bruker entall når det dreier seg om flere ting som hver enkelt bare har én av.

Forslag:

*En la centro de la placo levigas giganta (kolosa) obelisko de pli ol 25 metroj (pli ol 25-metra), kiun apogas la dorso de kvar bronza leonoj.*

Når setningen nå er oversatt, ser vi på «bronseløver», og finner at bronzo-leono er en dårlig løsning, bronzo-leono brukbart men tungt, *bronza*

*leono* det som passer best i språkets struktur.

4. De tre resterende setningene skulle ikke by på noen spesielle vanskeligheter. Vi tar dem under ett og diskuterer enkelte småting etterpå.

*En la pinto de la obelisko staris, laŭ la tradicio, ora urno kun la cindroj de Cezaro. Hodiaŭ la obelisko kaŝas relikvon de la sankta kruco. La translokigo kaj la levado sur la Placo de Petro okupis preskaŭ mil laboristojn dum kvar monatoj.*

På esperanto er det ikke ueffent å sette komma før og etter ledd som laŭ la tradicio. Det deler opp på en måte som gjør setningen smidigere, lettere å lese, og også muntlig gir det en god effekt. Som ved bronseløvene ovenfor deler vi også gullurnen i to ord, for *orurno* låter ikke bra og er ikke umiddelbart forståelig. *Cindroj*, som betyr aske, brukes gjerne i flertall når det gjelder de jordiske levninger av mennesker (for øvrig også når det ikke har vært kremasjon). Istedenfor *kaŝas* kan man naturligvis like godt si *enhavas*. Navnet på plassen kan gjerne være *Petra Placo* eller også *Placo de Sankta Petro*. *Okupis* i siste setning betyr *laborigis*, men dette ordet forbyr seg selv på grunn av laboristojn i samme setning. Endelig «i fire måneder»: når «i» om tiden betegner hele den nevnte periode, bruker man *dum* eller *en*. Man kan også konstruere med akkusativ (n-form) *kvar monatojn*, men bør unngå det akkurat her da det står en annen akkusativ like inntil (variasjon!)

\*

→

## JUBILEOJ

### Nelly Bjørge Nilsen 75-jara

Nelly Bjørge Nilsen fariĝos 75-jara la 6an de junio, kaj ni salutas kaj gratulas. Samtempe ni gratulas pro 40 jaroj de aktiva esperantisto kaj membro de Bergen Esperantoklubb ek de la fondiĝo en 1935. Ŝi nun loĝas ĉe sia filino en Anglujo, sed ni havas la esperon, ke la jubileo estu celebrata inter esperantoamikoj en Bergen.

Jenny Jahren.

### Kjell Offerdal 60-jara

La 26-an de marto ĉi-jare konata bergeno en Esperantujo festis la 60-an datrevenon de sia naskiĝtago.

Kjell Offerdal komencis lerni Esperanton, kiam ankoraŭ ne estis Esperantoklubo en Bergen. Li estas unu el la fondintoj de la bergena klubo. Kvazaŭ fidela edzo li kunvivis kun ĝi «dum bonaj kaj malbonaj tagoj».

Dankon al C.S.B. pro la korekto koncerne la bananplanton. Li kompreneble estas tute prava. Eraroj devus ne ekzisti en instrua teksto — tamen ja estas konsolo, ke la eraro estas botanika kaj ne lingva! Sed vidu Montagu C. Butler Esperanto-English Dictionary, kaj vi trovos: bananarbo, kaj Plena Vortaro klarigas, ke banano estas «mangebla, fingroforma frukto de tropika arbo». Tio neniel senkulpigas min, sed montras nur, ke la eraro estas kvazaŭ tradicia.

Ak. III

Liaj samklubanoj konsideras lin ne kiel ordinaran membron, sed kiel unikulon. — Li abundas de ideoj kaj estas plena de neelĉerpebla optimismo.

Ek de sia esperantistiĝo li estis konvinkita pri la granda valoro de Lingvo Internacia. Kiel fakdelegito de U.E.A. li faris gravan laboron sur la turisma kampo. Li havas multajn kontaktojn en proksimaj kaj malproksimaj landoj. Li ankaŭ ne neglektis sian hejmurbon. Li estas la unua, kiu laŭ licenco rajtas prezenti Bergen al turistoj pere de Esperanto.

Li ankaŭ ŝatas *Vojaĝi* kiel turistoj, sed ne engrupe. En la klubo li ofte en sia seka, sed humurplena maniero rakontis pri siaj vojaĝtravivaĵoj. — «Kaptu la ŝancon, se ĝi aperas!» ŝajnas esti lia vivregulo.

Kara Viktimvalo, (lia voknomo en la klubo) viaj samklubanoj, kaj certe multaj geamikoj el diversaj landoj, kore gratulas vin! Ni deziras al vi sanon, feliĉon kaj ĉion bonan! Restu fidela al «nia afero» kaj aktiva batalanto ĝis la lasta bis!

A. B.

### L. Sinha 70-jara


La 6an de Junio la konata hinda esperantisto Lakshmiwar Sinha fariĝos 70-jara. S-ro Sinha konatiĝis kun Esperanto dum restado en Svedujo antaŭ proks. 40 jaroj kaj fariĝis pioniro de nia lingvo en sia hejmlando. Li ankaŭ plurfoje vizitis nian landon kaj faris prelegojn, kaj certe multaj el niaj malnovaj membroj memoras lin. Okaze de la jubileo ni kore gratulas.

# FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Redaktoro: Odd Kolbrek



El «VART YRKE»

## Pli granda rapideco por la eŭropaj trajnoj.

Evoluadplano por modernigado de la eŭropaj fervojoj estas lanĉita de UIC, la internacia fervojunio. Ĝi koncernas proksimume 40 000 km de la 250 000 km de la fervojlinioj. Por iom pli ol 13 000 km fariĝos ampleksa modernigado por atingi rapidecojn ĝis 200 km hore. Proksimume 5800 km da novaj linioj konstruiĝos por rapidecoj ĝis 300 km hore. UIC starigis plankomitaton kiu studis la eŭropan fervojreton kaj lokalizis regionojn kun granda trafiko kiuj devus esti interligataj al granda rapideceto. Grave estas ke la kapacito de la linioj inter la grandaj trafikregionoj sufiĉos, ĉar laŭ dutrakaj linioj kun modernaj trakciiloj kaj signalekipaĵo veturos 200—220 trajnoj kaj laŭ unu-trakaj — po 60 trajnoj en ĉiu tagnokto. Pro la servado la veturtempo por distancoj ĝis 500 km estus pli mallonga ol per aŭtomobiloj kaj ne pli longa ol per aviadilo enkalkulitaj la atendtempo kaj la vojaĝtempo de kaj al la flughavenoj. La meznombra rapideco estus proksimume 135 km hore por povi konkuri kun la aŭto-

mobiloj. Laŭ iuj distancoj devas, laŭ teknika kaj ekonomia vidpunktoj, esti rapidecoj ĝis 200 km hore. Tie, kie la kapacito de la nunaj linioj estas tro malgrandaj, sed estos kondiĉoj por novkonstruado, la linioj konstruiĝos por rapidecoj ĝis 300 km hore. Por pli ol 500 km longaj distancoj oni konsideris konkuradon kun la aviadiloj esti malmulte realeca, sed estas bona merkato por dormvagontrafiko ĝis 8—12 hora vojaĝtempo. Oni proponas konstruadon de novaj linioj en 15 landoj — entute 5785 km — kaj la plano plejparte plenumiĝos ĝis 1985.

En Italujo baldaŭ finkonstruiĝos nova projekto, la grava interlig-linio Firenzo—Rom, — «Direttissima» — kun tre granda normo. Granda parto de ĝi, i.a. la 5400 m longa ponto trans la rivero Paglia, jam estas preta. Ĝi mallongigas la distancon per 60 km kaj la vojaĝtempo per proksimume 1,5 horoj. La plej rapidaj trajnoj ne bezonas pli ol 1,25 horojn laŭ la 253 km longa distanco. Estas 75 km da tuneloj — lumigitaj — kaj 31 km da viaduktoj. Ĉiuj relkrucejoj estas malsamnivelaj. La plej malgranda kurbradiuso estas 3000 m kaj la relpezo po 60 kg por m. La malnova du-traka linio daŭre estos uzata. Tio ebligos

veturigadon de po 600 trajnoj en ĉiu tagnokto laŭ la distanco, kie okazas 30 % de la itala fervojtrafiko.

La ĝenerala sekretario de UIC, B. de Fontgalland, substrekis ke la lanĉado de la evoluadplano ne estas prestiĝo por la eŭropaj fervojoj sed necesas, ne nur por fortigi la konkureblecon kontraŭ la konkurantoj, sed por solvi la taskojn kiuj ŝarĝiĝos al la fervojo pro la energiproblemoj, kiuj altrudiĝos.

## Vizitu nian fervojmuzeon en Hamar.

Kiom da homoj en nia lando scias pri nia fervoja muzeo en Hamar? — Estas mirinde ke eĉ multaj el la urbanoj neniam vizitis ĝin. Kial ne? Belege la muzeo situas apud nia plej granda lago Mjøsa, kaj en la sama regiono troviĝas la Hedemark-Muzeo kun la famaj katedralruinoj kaj unuranga kampadejo. Ĉi tie oni povas pasigi sian someran libertempon, bani sin, fiŝkapti kaj fari ekskursojn al la eksterurbaj regionoj. Entute, ĉi tie troviĝas multaj eblecoj por ĝojo kaj distrado.

La fervoja muzeo fondiĝis en la jaro 1896, kaj dum multaj jaroj ĝi situis en Disen, urboparto ĉe alia flanko de la urbo. En 1954 oni translokiĝis la tutan muzeon al la nuna idilia loko ĉe Mjøsa. La belaj ĉirkaŭaĵoj multe kontribuas al tio ke la nombro da vizitantoj ĉiujare pligrandiĝas. Sed certe estas, ke la intereso pri nia muzeo estas kreskanta. La muzeo abundas de malnovaj fervojaĵoj, sed ankaŭ de pli modernaj aĵoj. Ĉi tie oni povas rigardi iujn el la plej

malnovaj vaporlokomotivoj, kiuj restas de tiu tempo kiam la vaporo estis la reĝo. En la lokomotivhalo staras «Karoline», vaporlokomotivo kiu havis la honoron tiri la centjaran jubiletrajnon en Oslo. Ĉetero ĝi ankaŭ partoprenis en la filmo «Song of Norway». Majeste en propra halo staras «Dovregubben», la plej granda lokotipo vapora, konstruita en Norvegujo. Kaj ekstere, laŭlonge de tiu halo, trafikas la konata liliptufervojo «Tertitten». Dum la somera sezono ni povas enrajniĝi kaj vojaĝi tien kaj reen, entute 1000 metrojn. El personvagonoj precipe vidindaj estas la bone konservataj reĝovagonoj kun belaj internaĵoj. Ankaŭ troviĝas malnovaj stacidomoj de la komenca epoko en la norvega fervojtrafiko kun ekipaĵo de la sama tempo. En la granda muzehalo vi trovas ĉion kion vi deziras rigardi kaj ekscii pri fervojoj. Unu el la plej popularaj allogaĵoj ĉi tie estas la konata modelfervojo kiu ĝojigas kaj infanojn kaj plenkreskulojn. La biblioteko abundas je fervojliteraturo, proks. 8000 volumoj da libroj, 3000 manskribaĵoj, 40000 fotoj, mapoj kaj desegnaĵoj. Nia muzeo vere estas vizitinda. Se vi ne havas propran aŭton, aŭtobusoj trafikas la tutan tagon de la urbocentro je ĉiu duona horo kaj haltas apud la muzeo enirejo. Do — ni atendas vin.

*Kåre Bye.*

## Fervojista Tago

Dum la 60-a Universala Kongreso en Kopenhago okazos Fervojista Tago mardon la 29an de Julio. Prelego kun filmoj, lunĉo, gastigado de D.E.F.A.

## ★ Recenzoj ★

Bukar: Gizela kaj Roberto.  
5 skeĉoj. 32 paĝoj. Dansk Esperanto-Forlag. Prezo: n.kr. 6,00.

La libro kun 5 skeĉoj certe estas tre bonvena kiel amuza distraĵo en la kluboj. Oni ĉiam rimarkas, ke la klubanoj tre ŝatas skeĉojn, ĉar la ĉeestantaro ĉiam estas pli granda, kiam oni en la programo anoncas skeĉojn.

La unua skeĉo estas tro longa por ordinara klubkunveno; sed ĝi havas amuzan temon, kaj oni eble povus mallongigi ĝin. Ĝi eble eĉ profitus per tio, ĉar amatoraĵoj pli facile majstras malpli longajn frazojn.

La 4 aliaj skeĉoj havas varian kaj pli kontingantan longecon. Bone estas ankaŭ, ke la verkinto uzas simplan vortordon kaj ne tro multajn participojn. Oni ja ludas por novuloj kaj spertuloj en la Esperanto-kluboj, kaj ĉiuj devas havi ŝancon kompreni. La aktoroj devas uzi la temperamenton por bone ludi kaj ne povas malrapide paroli, por ke ĉiuj komprenu.

La skeĉoj estas amuzaj kaj bonaj kaj havas neatenditajn finiĝojn, kaj mi esperas, ke la verkinto, Bukar, denove verkos novajn skeĉojn por vigligi niajn Esperanto-klubojn.

B.

Rigmor Christophersen: Else kaj Bo (trad.: Gudrun Riisberg, il.: Thora Lund). 40 paĝoj. Dansk Esperanto-Forlag. Prezo: n.kr. 7.

La libreto enhavas du rakontojn, unu pri Else kaj unu pri la knabo Bo. De sia instruisto Else lernas, ke oni

«ĉiam devas esti helpema al aliaj homoj». Else estas bona knabino, kiu tuj komencas helpi al ĉiuj, kiujn ŝi renkontas, ne pripensante ĉu ŝi eble ne multe kapablos. Subite ŝi ekhavas multajn malfacilaĵojn, sed okazas io, tiel ke ŝi finiĝas je kontento kaj ĝojo por ĉiuj.

Bo estas 7-jara knabo, kiu havas multajn eblecojn ludi en la arbaro ĉe sia hejmo, kaj li gaje ludas la tutan tagon. Sed li tute forgesas, ke li devas memori tion, kion la gepatroj diras al li. La gepatroj ruze, en amuza, bona maniero, aranĝas la aferojn tiel, ke li bone lernas memori.

La libreto havas klaran, simplan lingvaĵon, mallongajn, facilajn frazojn, kaj la ideoj certe estas tre instruicaj por la malgrandaj infanoj, kaj sufiĉe distraj kaj viglaj por kapti ilian intereson.

La desegnaĵoj de Thora Lund estas viglaj kaj amuzaj, kaj la libreto certe plaĉos al geknaboj kaj ricevos multajn fervorajn legantojn.

B.

**Aldono al la recenzo de Kompleta lernolibro de regula Esperanto de L. Mimo.**

La libro konsistas el tri partoj (nomataj «libroj»). En mia recenzo mi pritraktis la trian libron. Mi volas aldoni kelkajn komentojn pri la unua kaj dua libroj.

La unua libro estas intencata kiel lernolibro por kursoj. Mi ne havas iun gravan kritikon kontraŭ la gramatikaj reguloj en tiu parto. Mi plej multe ŝatas la duan libron, kiu pritraktas la konjugacion de la verboj kaj havas la subtitolon: La tuta kon-

jugacio en ok senesceptaj reguloj. Mi precipe ŝatas lecionon 19 pri participoj kaj kompleksaj verbotempoj kaj lecionon 21 pri la kondicionalo. Mi notas ke LM donas multajn ekzemplojn el kiuj la plej multaj estas Zamenhofaj. En la leciono pri participoj kaj kompleksaj verbotempoj preskaŭ ĉiuj ekzemploj estas Zamenhofaj.

Mi havas unu kritikon kontraŭ la leciono pri aspektoj: La prefikso *el-* ne ĉiam povas esti uzata por esprimi la finan aspekton. Oni bezonas ankaŭ alian prefikson ekzemple *fin-*.

*Olav Reiersøl.*

Lienhardt, A.: Modela prononco de la interlingvo Esperanto. Represaĵo el Scienca Revuo. 16 p. Prezo: kr. 2,50.

La kajero enhavas antaŭparolon kaj multege da ekzemploj kun prononcindikoj de vokaloj, konsonantoj, diftongoj, konsonant-duopoj kaj vortoj. La aŭtoro havas siajn apartajn ideojn pri diversaj detaloj de la lingvo, ankaŭ pri la prononco, kaj oni rimarkas la influon de lia nacia lingvo, la franca. Li ekz. konsilas, ke la vokalon *e* oni prononcu en nefermitaj silaboj kiel malvastan francan *é*, en fermitaj silaboj kiel francan *ê*, dum Zamenhof rekomendas, ke oni ĉiam klopodu prononci ĝin kiel *ê*. En kunmetitaj vortoj li volas doni akcenton al ambaŭ partoj, kontraŭe al la ĝenerala regulo de nia lingvo. La kajero celas esti «lernilo pri modela prononco». Mi ne povas rekomendi ĝin por tiu celo, sed kiel opiniesprimado ĝi povas esti interesa.

C.S.B.

## Recenzeto

Turisma Esperanto-Kalendaro 1975. Ciklostilita en malgranda formato; verŝajne senpaga. Eld.: Pola Esperanto-Asocio. Kun datoj kaj informoj pri la esperantistaj kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj en 1975. Ankaŭ la Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø havas sian lokon.

## Ni ricevis

ujon kun 10 belegaj poŝtkartoj kun esperanta teksto, el la «Stel-lago», ĉe 4 kilometrojn nordoriente de la urbo Gaŭking en Ĉinujo. La lago estas artefarita bazeno de 6 kv.km, kaj oni kreis el la miljara sed malzorgita parko novan idilian lokon kun pontoj, pavilonoj ktp. — La kartojn eldonis Fremlingva Eldonejo, Pekino.

## Al Fondajo Canuto

En nia klubo (Esperanto Klubo de Oslo) ni kutimas havi vesperan lotumadon, dum la kunvenoj, por helpi al la ekonomio de la klubo. La lotumaĵoj estas donacoj de klubanoj aŭ simpatiantoj.

Dum la klubkunveno de la 21an de Aprilo 75a ni decidis donaci al UEA sumon egalan al tiu sumo enspezota dum la lotumado por tiu tago. La sumo fariĝis kr. 200, kiujn ni sendis al vi, F. Canuto, pere de nia ĉefdelegito.

Per tio ni deziras instigi ĉiujn esperantoklubojn en la mondo agi simile por helpi al la ekonomio kaj laboro de UEA.

por la Esperanto Klubo en Oslo  
*Pepita de Caspary*



## Norvega Kronika

### KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

17/2-75. La prez. bonvenigis kaj ĉar estis la unua tago de la Semajno de Internacia Amikeco, la programo estis skribado de salutkartoj kaj al gamikoj kaj al radiostacioj kiuj elsendas programojn en Esperanto. Tiucele Thor M. Carlsen kunportis belajn kartoj kaj poŝmarkojn kaj Ludvig Anjer glumarkojn. — Ludvig Anjer preparolis la semajnon, i.a. klarigante ke la Universala Kongreso aprobis ĝin en 1969 laŭ propono farita de s.ro E. Carlén dum la Universala Kongreso en 1968. Plue li substrekis, ke oni ne forgesu la internacian kaj homan flankon de ĝi kaj ke ĝi estu donaco al la cetera mondo pri amikeco kaj ankaŭ ne nur pere de Esperanto.

La prezidanto petis al la ĉeestantoj skribi al N.R.K. (La vojaĝradio) por instigado pri programoj en Esperanto.

Gesinjoroj Romsdal el Alta partoprenis la kunvenon, kaj ili informis ke estas starigita klubo tie kun 9 membroj.

Vendiĝis libroj por 72,55 kr.

5/3. *Ĝenerala kunsido.* Post bonvenigo de la prez., Kjell Gustavsen elektigis kunvenprezidanto de la ĝenerala kunveno. Unue aprobis la jarraporto kaj poste la komisiitoj donis siajn raportojn. Speciale menciinda estas tiu de Eldonejo Esperanto, ĉar la librovendado estis ege kontentiga pasintjare. La kalkularaporto, kiu montris bonegan rezulton, aprobis. Post informo pri budĝetpropono por

1975 elektigis C. Støp-Bowitz, laŭ propono de la estraro, kiel honora membro de Klubo Esperantisto. Tre kortuŝe li dankis pro tiu granda evento. La elektoj donis jenan rezulton: Prezidanto: Pepita de Caspary (reel.) Vicprez.: Thor M. Carlsen (reel.) Sekretario koresp.: Kirsten Ek (reel.) Sekr. raport.: Odd Kolbrek (reel.) Kasisto: Lovise Bøe (reel.) Estraranoj: Randolf Grotmål kaj Asbjørn Næss (novaj).

La prezidanto dankis pro la fido kaj dankis al la ceteraj estraranoj — speciale al Brynhild Østmo kiel multjara estrarano kaj bonvenigis la novan, Asbjørn Næss. C. Støp-Bowitz donis kelkajn informojn, kaj fine okazis divenkonkurso, aranĝita, kiel kutime, de Thor M. Carlsen. — La librovendado donis novan rekordon, 436,50 kr.

17/3. La prez. bonvenigis — aparte lernantojn kiuj partoprenas la kurson por komencantoj gvidatan de Tamiko Kaŭakami-Nielsen kaj s.ron Justin Minani el Burundio.

C. Støp-Bowitz donis kelkajn informojn, i. a. pri admono pri apogo al la diversaj fondaĵoj de N.E.L. kaj al la Kampanjo Reisæter.

Nia gasto el Burundio faris tre interesan paroladon pri sia lando, pri la triboj kiuj loĝas tie, pri la historio de la lando kaj precipe pri la terura sorto kiu trafis la tribon «Hutu» — ½ miliono da hutuoj ekde 1972 estis mortigataj de la tribo «Tutsi» —, kaj pri la tre malfacilaj vivkondiĉoj kiujn havis kaj havas la hutuoj, — J. Minani estas hutu —. Dum Ludvig Anjer funkciigis la lumbildaparaton,

li pere de lumbildoj donis bonan impreson pri la lando kaj pri la vivmaniero. Pere de sonbendo ni aŭskultis al kelkaj melodioj, kaj li montris kelkajn objektojn kaj modelojn de objektoj el Burundio. Li klarigis pri la lingvo tie kaj pri Sŭahili, kiun parolas 30 milionoj da afrikanoj, kaj fine li respondis al la multaj demandoj kiujn la scivolemaj ĉeestantoj

2/4. Post bonvenigo de la prez. ŝi atentigis pri «idekesto» en kiu ŝi admonis ke la klubanoj enmetu multe da bonaj ideoj. C. Støp-Bowitz faris interesan paroladon pri la temo «Interne de U.E.A.». Li preparolis ĝian historion, la starigon de la jarlibro, la delegitosistemon kaj la aliĝadon de la landaj asocioj. Plue li preparolis la funkciadon de U.E.A., la diversajn ŝtupoj de la organizado, la gvidadon, menciante la komitatsistemo, la estraron kaj la centran oficejon en Roterdamo, la diversajn gazetojn — speciale la gazeton «Esperanto», la eldonagadon kaj la financon staton.

Dum ĉiuj kunvenoj en la klubo okazas lotumado, kaj laŭ propono de C. Støp-Bowitz la prez. informis ke oni dum la venonta estrarkunveno diskutos kaj kredeble decidos ke la gajno de la lotumado dum unu el la klubkunvenoj iru al U.E.A. Kelkaj anoj faris demandojn kunlige al la parolado de C. Støp-Bowitz, al kiuj li kaj Ludvig Anjer donis respondojn.

Dum la ĝenerala kunveno de la klubo prokrastigis la elekto de la komisiito por Eldonejo Esperanto, kaj je la fino de la kunveno reelektigis Eva Støp-Bowitz, kaj kiel anstataŭanto elektigis Ragna Jacobsen.

Vendiĝis libroj por 119,85 kr.

### LA NORDA STELO, Hamar

Jarkunveno okazis la 19an de Marto en la Fervojmuzeo. La prez. deziris bonvenon. Sekvis la raporto pri la pasinta jaro. Post unu rimarko aldona al la raporto, ĝi estis aprobita. La kasisto voĉlegis sian raporton pri la ekonomia stato de la klubo. La reviziita kalkulaĵo estis unuvoĉe aprobita. La prezidanto rifuzis reelekton, kaj oni elektis Alf Strømnnæss kiel novan prezidanton. La nova estraro estos jena: Alf Strømnnæss, prezidanto; Kåre Bye, vicprezidanto; Johs. H. Lund, kasisto; Elise Koller, sekretario; Else Stang, membro. Anstataŭantoj: Elisabeth Christensen kaj Else Krogstie.

Per Johan Krogstie sciigis, ke li tradukis Esperanten broŝuron pri la Hedmarkmuzeo kaj ke ĝi baldaŭ estos eldonata. — La kunvenvidanto voĉlegis la martan cirkularon de NEL. Ĝi enhavis i. a. sciigon pri vizito de samideano de Burundi venontan vintron. Oni samopiniis ke estus interese lin vidi en Hamar. Oni ankaŭ sciigis pri la malfacila ekonomia stato de la Kontorfondaĵo kaj la Propagandfondaĵo. Post propono oni decidis sendi donacon kr. 100 al ambaŭ fondaĵoj. La geklubanoj sendis gratulsaluton al la nova klubo en Alta.

Okazis lotumado kiu donis kr. 36,75 al la kaso.

Sino Ester Bye invitis al la tablo kie ŝi malavare regalis per buterpanoj, vino, kafo kaj grandioza kremkuko. — Poste ŝi ankaŭ regalis per ĉarma pianomuziko.

Tri el la klubanoj, Elisabeth, Else kaj Elise ludis skeĉon de Gudrun Riisberg: «Inter amikinoj». Ĝi estis



bone akceptita. — Fine la nova prez. dankis al la prez. pro bone farita laboro kaj finis nian jarkunvenon.

**LA URSO, Sarpsborg,**

kunvenas regule ĉiun duan semajnon. Dum la postkristnaska kunvena periodo funkcias studrondo pri lingvo kaj stilo. La prez. J. Hammond Rosbach, detale trastudigas ĉapitron el «Verda robo», montrante stilistikajn fenomenojn, analizante pensojn kaj etimologie klarigante la vortojn kaj iliajn devenojn kaj familiecon kun konataj vortoj en aliaj lingvoj. — Cetere li legas en ĉiu kunveno novan parton de la nun verkata romano «Murda domo», kiu ne estos krimromano malgraŭ la titolo.

En unu kunveno Rosbach faris, okaze de la 500-a datreveno de la naskiĝtago de Michelangelo, prelegon kun bildoj pri la vivo kaj la arto de tiu giganto.

Unu kunveno estis publika, en kunlaboro kun la Popolakademio. Oni kunvenis en la Urba Biblioteko, kie s-ro Justin Minani, kun Rosbach kiel interpretanto, faris interesan prelegon pri la genocido kun la teruraj masakroj en lia hejmlando Burundio. Post la prelego s-ro Minani respondis al amaso da demandoj el la aŭskultintaro.

**MARA VENTO, Haugesund,**

okazigis la unuan kunvenon en la nova jaro 16/1. La programo estis ĉefe dediĉita al la esperanta literaturo.

Estis alveninta stoko da libroj novaj, kaj la kluba komisiulo aranĝis altirajn libro-tablojn. La prez. informis pri kelkaj el la libroj laŭlegante pecetojn el ili, kaj dum la pli posta paŭzo relative multaj libroj vendiĝis.

La 16/1 estas ankaŭ la naskiĝtago de «Mara Vento» kaj estis laŭlegata telegramo de N.E.L. kun plej koraj gratuloj okaze de la 40-jara jubileo. Estis decidate prokrasti la celebradon de la jubileo ĝis la aŭtuno.

Tre belan kaj plaĉan naturfilmon danan prezentis Sigmund Blikshavn. Estis filmo plena de arbar-etosoj kaj kun diversspecaj bestoj vikle vivigantaj la delikat-kolorajn pejzaĝojn.

oto

**NORSK ESPERANTO-FORBUND**  
(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 30  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:*

Boks 942, Oslo. Postgiro 100 32

**ESPERANTOFORLAGET A/S**  
(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 31  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

*La redakcio:*

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,  
6500 Kristiansund N. Telefon: 776 20

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*  
Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal